

BOHEMA ESPERANTISTO

# ČESKÝ ESPERANTISTA

Měsíčník pro šíření esperanta a esperantismu mezi Čechy  
Orgán „SVAZU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ“ v Rakousku.

Redakce a administrace: Praha III, Kampa 495.

Redaktor:

H. K. Bouška,  
Praha-Smíchov 1097.

Vydavatel:

Jan Iglauer,  
Praha III, Hroznová 6.



ROČNÍK IV

SEŠIT 6

Články. — Artikoloj.

Jos. Krumpholtz: *Význam esperanta pro Čechy a Slováky.* — Dr. L. L. Zamenhof-Karel Maršík: *O vzniku esperanta.* — T. G. Masaryk-Rud. Hromada: *Moderna amo.* — Dr. Stan Kamaryt: *Propagando de internaciaj movadoj.* — Ern. Trummlitz: *La sep korvoj.* — Fr. Procházka-Rud. Fridrich: *Ŝtelinto de ŝlosiloj.* — Bšk.: *Mladí čeští esperantistoj. Junaj bohemiaj esperantistoj.*

Zprávy spolkové.

Pražští esperantistoj. Česká společnost esperantistů v Praze. Kroužek esperantistů ve Chvalkovicích. Klub esperantistů na Kladně. Klub esperantistů, hádankářů a šachistů ve Vítkovicích. Z mimosvazových spolků českých esperantistů. Pro propagační fond »S. č. e.«

PRAHA, 20. V. 10.

Cena 36 h

Vychází 20. dne v měsíci a je zdarma zasílán všem členům »Svazu českých esperantistů«, kteří zaplatili celoroční příspěvek 5 K. — Rukopisy, dopisy, knihy a časopisy zasílají se redakci. — Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka na odpověď. — Všecka díla redakci zasláná jsou oznamována. Reklamace přijímá administrace jen do vyjití následujícího čísla. — Předpláceti a po číslech odebíratí lze u administrace a ve všech knihkupectvích.

## PSACÍ STROJE — SKRIBMAŠINOJ

nové i opotřebené, všech systémů, výhodně a se zárukou dodává firma novaj kaj bezonitaj, ĉiusistemaj, plej oportune kun la garancio estas liverataj

de firmo F. Tůma, Praha,

Jindřišská ulice čis. 26, Čechy. (Bohemujo).

Zásilky pro »S. č. e.« adresujte: Mil. Schmidt, Praha-II. 1036/XIV.

Celoroční předplatné 4.— K.



## Ĉeský esperantista-Bohema esperantisto

(Red. kaj adm: Praha III, Kampa 495, Bohemujo-Aŭstrio; Jarabono Sm 170) monata revuo por propagando de esperanto kaj esperantismo inter Bohemoj, oficiala organo de „**Bohema asocio esperantista**“ (Svaz českých esperantistů), eliras regule la 20-an de ĉiu monato en kajeroj almenaŭ 16-paĝaj enhavante krom bohemaj informaj artikoloj multajn esperantajn, originalajn kaj tradukitajn, amuzajn kaj klerigajn artikolojn kaj notizojn pri temoj aktualaj kaj internaciaj.

La manuskriptoj, leteroj, libroj kaj gazetoj estu sendataj al la redakcio, la abonpago al la administracio. Ĉiuj verkoj en kiu ajn lingvo ricevitaj de la redakcio estas registrataj; recenzoj estas publikigataj pri la verkoj ricevitaj almenaŭ en du ekzempleroj. La redakcio rezervas al si la rajton korekti la manuskriptojn. Represo kaj traduko, se ili ne estas speciale rezervitaj, estas permesataj, se oni citas nian revuon kaj sendas 3 ekzemplerojn al la redakcio. La redakcio respondas la leterojn sole per la gazeto, ne per la poŝto; kiu bezonas rapidan respondon letere, aldonu poŝtmarkon. Specimenon oni sendos kontraŭ unu respondkupono.

**Upozornění.** Zdravotní můj stav bránil mi v poslední době psáti. Tím se stalo, že zpozdílo se vydání tohoto čísla, že musil jsem odložit všechny rubriky do příštího dvojčísla a že nemohl jsem odpovědět na množství dopisů redakčních i privátních. Prosím tímto všechny přátele za prominutí a strpení. Přestávku ve vycházení vyrovnám dvojčíslem (7—8), které vyjde 20. června se všemi rubrikami, na dopisy odpovím dle okolností buď dopisem během čtrnácti dnů nebo v listárně příštího dvojčísla. Lidem shovívavým můj vřelý dík. *Bouška.*

### Esperantská korespondence — Esperanta korespondado.

Jednonásobné otištění oznámení stojí 60 h., trojnásobné K 150. Členové svazu a spolků sdružených platí pouze 40 hal., resp. 1 K. Pro přímé předplatitele je první otištění zdarma. — Vyměňovati dopisy<sup>1)</sup>, pohlednice<sup>2)</sup>, pošt. známky<sup>3)</sup>, přejí si:

53. F-ino Josefina Šimkova en Ĉervený Kostelec, Bohemujo-Aŭstrio<sup>2)</sup>. — 54. Vilhelmo Goldschmidt, Budapeŝto VII., Dob-utča 31, I. l., Hungarujo<sup>2)</sup>. — 55. Zdeněk Misar 146, poste rest. Praha, hl. pošta, Ĉiam kaj tuj respondos<sup>1) 2)</sup>. — 56. L. Vvedensky, elévo de 4-a klaso ĉ. gimnazio Voronež, Rusujo<sup>2)</sup>. — 57. Ondřej Srámek, Prostějov, Manesova ul. 16., Moravio-Aŭstrio. — 58. Richard Bláha, studento, Hronov, Bohemujo-Aŭstrio<sup>1) 2) 3)</sup>. — 59. Jan Gabzdyl, maŝinmajstro en Vítkovice, Moravio-Aŭstrio (kor. kun fremdlandoj samideanoj; ĉiam respondas).

La unufoja enpresado de l' anonco kostas 25 sd. trifoja 63 sd. La anoj de l' asocio kaj aliĝintaj societoj pagas sole 17 sd, resp. 42 sd. Por la abonintoj la unua enpresado estas senpaga. — Interŝanĝon de leteroj<sup>1)</sup>, ill. poŝtkartoj<sup>2)</sup>, poŝtmarkoj<sup>3)</sup> deziras:

**Vera bohema specialaĵo** en sia fako estas tutmonde konataj ŝaŭmantaj bonbonoj de Maršner por preparo de refreŝigantaj ŝaŭmlimonadoj. En la plej mallonga tempo ili atingis grandegajn sukcesojn kaj disvastiĝon en ĉiuj landoj de aŭstria monarkio kaj ili estas en la batalo kontraŭ alkoholismo la plej bona kaj ideala kompensaĵo de alkoholaĵoj. Ŝaŭmantaj limonadaĵoj bonbonoj estas ankaŭ danke iliajn eminentajn ecojn tre grava faktoro sankonservanta, ĉar ili efikas refreŝige je laciĝinta organismo, ili subtenas digestadon kaj plenumas ĉiujn higienajn postulojn. Ilia prezo estas trege malgranda, tial rajte apartenas al ili nomo de la plej bona popola trinkaĵo. (Vidu la anoncon sur la lasta paĝo de l'kovrilo).

**Trika**

punĉochy - ponožky - rukavice

vyrábí a nejlevněji dodává

**HUGO SVOBODA,**  
Král. Vinohrady, Palackého tř. 12 n.



## VÝZNAM ESPERANTA PRO ČECHY A SLOVÁKY.

Napsal Jos. Krumpholtz. — (Pokračování.)

Pravdou-li — a kdo by o tom pochyboval? — že nejdůležitější změny ve vývoji lidstva působí zdokonalení jeho nástrojů, z nichž jedním, a to z nejdůležitějších, jest také mluva, řeč, hlavní to nástroj ducha lidského, hle, jak snadno lze nám tedy uspíšiti dosažení jinak ještě tak dalekého cíle, jakým jest, neb byla by, idea vzájemnosti Slovanů a všech národů — bez esperanta!

Hle, jak vhodná, jak mnohoslibná naskytuje se nám tím příležitost navázati přátelské styky s lidmi dobré vůle všech národů, styky, jež připravovaly by a urovnávaly cesty do onoho velebného chrámu občanského a všelidského smíru, v němž bohdá vláda spravedlnosti a rovnosti konec učiní mezinárodním válkám a nenávisti a zajistí světu mír ne ustavičným zbrojením, ale vzájemným pochopením, oceněním a uznáním potřeby lidské solidarity, vzájemnosti národů.

A něco lepšího nežli vzájemnost nikdo nám ještě ne navrhl a také v budoucnosti sotva dovede ukázati.

»Mezi čtyřmi stěnami« — praví Kollár v německém svém spise o vzájemnosti — »nemůže člověk, mezi hranicemi země nemůže kmen svého vychování dosíci. Lidmi a národy v nejkrásnějším slova smyslu stáváme se teprve náhledem v celek člověčenstva, bez něhož jednotliví lidé jenom dětmi, národové a kmenové jenom barbary zůstávají.«

»Čím menší okolí« — pokračuje — »čím oddělenější společnost, kde žijeme, tím menší, nechutnější, nesnášlivější jsou naše pojmy, knihy, jež píšeme, umělecká díla, jež vyvádíme, protože nám mimo to nic není známo, co by nás k blahočinnému porovnávání a podněcování vésti mohlo. Obmezení takovíto lidé a kmenové mají za to, že každá potažná velikost už také nejvyšší jest velikostí a dokonalostí; ale kdož mezi vrabci první jest, není jím ještě mezi ptáky. Žádný národ a žádný kmen nesmí se odříkati výhod revnivosti: neb kde není revnění, tam není pokroku.«



Kolik pravdy tají se ve slovech těch!

A tak právem malost a nedostatečnost naše vždycky nás povedou ke vzájemnosti s ostatními národy.

A výhody takové vzájemnosti — v níž esperanto poskytně nám služeb opravdu neocenitelných — jsou nejen mnohé, ale i nemalé: jsou duchovní (kulturní, osvětňé), hospodářské, politické, národnostní (jazykové), sociální atd., atd.

Vizme jen na př. vzdělání. Vzdělání národů — a vzdělání je moc! — je do značné míry vzděláním knižním a časopiseckým. Je pochopitelné, že čím nejednostrannější, čím »světovější«, rychlejší (včasnější) a lacinější jsou ony zdroje vzdělání, tím že jsou i plodnější, působivější, lidovější — národnější.

A tomu všemu překáží posud nejvíce mnohojazyčnost lidstva, nedostatek vzájemnosti a malost většiny národů.

(Pokračování).



## O VZNIKU ESPERANTA.

Výňatek z dopisu *Dra L. L. Zamenhova* N. Borovkovi. Z esperanta přeložil *Karel Maršík*. — (Pokračování.)

Tehdy často jsem začínal některé pokusy, vymýšlel důmyslná přebohatá skloňování a časování atd. Ale lidská řeč se svým, jak se mi zdálo, nekonečným množstvím tvarů mluvnických, se svými statisíci slovy, kterými mne děsily tlusté slovníky, zdála se mi takovým obratným a obrovským strojem, že nejednou jsem si říkal: »Pryč se sny! Ta práce není dle lidských sil«, — a přece vždy vracel jsem se k svému snu.

Německému a francouzskému jazyku učil jsem se v dětství, kdy nemožno ještě srovnávat a usuzovat, ale když, jsa v 5té třídě gymnasia, počal jsem se učit jazyku anglickému, padla mi do očí jednoduchost mluvnice anglické, zvláště díky náhlému přechodu k ní od mluvnice latinské a řecké. Tehdy jsem zpozoroval, že bohatství tvarů mluvnických jest jen slepý dějinný úkaz, ale ne nutný pro řeč. Pod takovým vlivem počal v jazyce hledati a zavrhovati tvary nepotřebné a zpozoroval jsem, že mluvnice vždy víc a více se rozplývá v mých rukou, a brzy došel jsem k mluvnici nejmenší, která zaujímala beze škody pro jazyk ne více nežli několik stran. Tehdy jsem se vážněji oddal svému snu. Ale obrovité slovníky vždy ještě nenechávaly mne klidným.



Kdysi, když jsem byl v 6té nebo 7mé třídě gymnasijské příležitostně obrátil jsem svoji pozornost k nápisu »Švejcarskaja«, který již mnohokrát jsem viděl, a potom ke štítu »Konditorskaja«. Toto »skaja« zaujalo mne a ukázalo mi, že sufixy umožňují z jednoho slova udělati slova jiná, jimž netřeba se zvláště učit. Ta myšlenka mne ovládla zcela a já náhle pocítil půdu pod nohama. Na hrozné obrovité slovníky padl paprsek světelný, a rychle počaly se zmenšovati před mýma očima.

»Otázka je rozřešena!« — řekl jsem tehdy. Uchopil jsem se myšlenky o příponách a dal jsem se do práce v tomto směru. Pochopil jsem, jaký veliký význam může míti pro jazyk uvědoměle tvořeném plné užití té síly, která v jazycích přirozených působí jen částečně, slepě, nepravidelně a neúplně. Počal jsem srovnávati slova, hledati mezi nimi stálé, určité vztahy a každodenně vymítal jsem ze slovníku novou obrovskou řadu slov, nahrazuje toto množství jedním sufixem, který značil určitý vztah. Zpozoroval jsem tehdy, že veliké množství slov čistě kořených (na př. matka, úzký, nůž atd.) může býti přeměněno ve slova utvořená a zmizeti ze slovníku. Mechanika jazyka byla přede mnou jako na dlani, a já nyní jal se již pracovati pravidelně, s láskou a nadějí. Brzy potom měl jsem již napsánu celou mluvnici a malý slovník.

Zde řeknu několik slov o materiálu pro slovník. Mnohem dříve, když hledal jsem a odvrhoval vše nepotřebné z mluvnice, chtěl jsem užití zásad hospodárnosti také pro slova, a přesvědčen, že je to zcela stejné, jaký tvar bude mít to neb ono slovo, jestliže jen dohodneme se, že ono vyjadřuje daný pojem, jednoduše vymýšlel jsem slova, snaže se, aby byla jak možno nejkratší a neměla zbytečný počet písmen. Řekl jsem si, že místo nějakého *n* písmenového slova »interparoli« (rozmlouvati) můžeme zcela dobře vyjádřiti touž myšlenku nějakým na př. dvouslabičným »pa«. Proto jsem jednoduše psal matematickou řadu nejkratších, ale nejsnadněji vyslovitelných spojení liter a každému z nich dal jsem význam určitého slova (na př. *a, ab, ac, ad, ba, ca, da, e, eb, ec, be, ce, aba, aca, atd.*). Ale tuto myšlenku jsem ihned zavrhl, poněvadž pokusy se sebou samým ukázaly mi, že taková vymyšlená slova jsou velmi nesnadná k naučení a ještě obtížnější k zapamatování si. Již tehdy jsem se přesvědčil, že material pro slovník musí býti románsko-germánský, změněný jen tolik, kolik vyžaduje pravidelnost a jiné důležité podmínky jazyka. Jsa již na této půdě, brzy jsem zpozoroval, že nynější ja-



zyky mají obrovskou zásobu hotových již slov mezinárodních, které jsou známy všem národům a činí podklad pro budoucí jazyk mezinárodní — a já pochopitelně využítkoval jsem toho podkladu.

V roce 1878. jazyk byl již více méně hotov, ačkoli mezi tehdejšími »lingwe uniwersala« a nynějším »esperantem« byl ještě veliký rozdíl. Zpravil jsem o něm své kolegy (byl jsem tehdy v osmé třídě gymnasijní). Většina z nich byla zlákána myšlenkou a do očí bijící neobyčejnou snadností jazyka a počala se mu učit. Dne 5. prosince všichni společně slavnostně jsme slavili posvěcení jazyka. Za této slavnosti řečneno v novém jazyce a my nadšeně zpívali hymnu, jejíž počáteční slova byla:

»Malamikete de las nacjes  
Kadó, kadó, jam temp' está!  
La tot' homoge in familje  
Komunigare so debá.«

(V nynějším esperantu to znamená: »Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! La tuta homaro en familion unuigi devas.«) \*)

Na stole kromě mluvnice a slovníku leželo několik překladů v novém jazyce.

Tak skončilo prvé období jazyka. Byl jsem tehdy ještě příliš mlád, abych vystoupil veřejně se svojí prací i rozhodl jsem se, že posečkám ještě 5—6 let a že za ten čas pečlivě vyzkouším jazyk a úplně propracuji jej prakticky. Půl roku po slavnosti z 5. prosince ukončili jsme gymnasijní studia a rozešli jsme se. Budoucí apoštolové jazyka pokusili se šeptati o »novém jazyce«, ale, setkavše se s posměšky lidí dospělých, ihned si pospíšili, aby zapřeli jazyk, a já zůstal zcela sám. Předvídaje jen posměch a pronásledování, rozhodl jsem se skryti přede všemi svoji práci. Po 5<sup>1/2</sup> léta svého pobytu na universitě nikdy nemluvil jsem s nikým o své věci. Ta doba byla pro mne velice těžká. Skrytost mučila mne; nucen pečlivě skrývati své myšlenky a plány, téměř nikde jsem nebyl, ničeho se neúčastnil, a nejkrásnější čas života — léta studenská — minula pro mne smutně. Někdy jsem se pokusil, abych se pobavil ve společnosti, ale cítil jsem se jakýmsi cizincem, vzdychal jsem a odcházel a čas od času ulehčoval jsem svému srdci verši v jazyce zpracovaném mnou. Jednu z těch básniček (»Mia penso«, Má

\*) Česky: »Nepřítelství národů padniž, padniž, již je čas! Veškeré lidstvo musí se spojití v rodinu!«



myšlenka) zařadil jsem pak do první brožury mnou vydané; ale čtenářům, kteří nevěděli, za jakých okolností tato báseň byla napsána, zdála se, pochopitelně, podivná a nesrozumitelná.

Po 6 let pracoval jsem zdokonaluje a zkoušeje svůj jazyk — a měl jsem dosti práce, ač v roce 1878. zdálo se mi, že jazyk jest zcela hotov. Mnoho jsem překládal do svého jazyka, psal jsem v něm díla původní a rozsáhlé pokusy ukázaly mi, že to, co zdálo se mi zcela hotovo theoreticky, jest ještě nehotovo prakticky. Mnoho musel jsem oskati, nahraditi jiným, opravit a radikálně přetvořiti. Slova a tvary, zásady a požadavky narážely na sebe a překážely jedna druhé, zatím co v theorii, vše zvlášť a v krátkých pokusech, zdálo se mi zcela dobré. Takové věci, jako na př. všeobecná předložka »je«, poddajné sloveso »meti«, neutrální, ale určitá koncovka »aŭ«, a t. d. — snad nikdy nenapadly by mi theoreticky. Některé tvary, které zdály se mi bohatstvím, ukázaly se nyní v praxi nepotřebnou přítěží. V roce 1878 zdálo se mi, že je pro jazyk dosti, když má mluvnici a slovník; těžkopádnost a neohrabanost jazyka připisoval jsem jen tomu, že ještě nedosti dobře jej ovládám; praxe tedy vždy více a více mne přesvědčovala, že jazyk potřebuje ještě jakési nechytitelně »něco«, pojící prvek, dávající jazyku život a určitého, zcela vytvořeného »ducha«. (Neznalost ducha jazyka je příčinou, proč někteří esperantisté, kteří velmi málo četli v jazyce esperanto, píší bez chyby, ale v těžkém, nepříjemném slohu, — kdežto esperantisté zkušenější píší slohově dobře a zcela stejně, ať náležejí ku kterémukoliv národu. Duch jazyka nepochybně časem mnoho, ač poznenáhlu a nepozorovaně, se změní; ale, kdyby první esperantisté, lidé různých národů, nebyli se setkali v jazyce se zcela určitým základním duchem, byl by každý tíhl na jinou stranu a jazyk byl by zůstal věčně, neb aspoň po velmi dlouhou dobu, neladnou a neživou sbírkou slov.)

Tehdy počínal jsem stříci se doslovných překladů z toho neb onoho jazyka a snažil jsem se, abych přímo myslil v jazyce neutrálním. Pak jsem zpozoroval, že jazyk v mých rukách přestává již býti stín toho neb onoho jazyka, kterým v té neb oné minutě se obírám, a dostává svého vlastního ducha, svůj vlastní život, vlastní, určitou a jasně vyjádřenou fysiognomii, nezávislé již od nějakých vlivů. Řeč plynula již sama, ohebně, ladně a zcela volně jako živý mateřský jazyk.

(Dokončení.)





## MODERNA AMO.

El la verkoj de *prof. T. G. Masaryk* tradukis *Rud. Hromada*.

### I.

Ĝi certe devas esti amo energia. La kristaneco muskola, kiel diras Jankees.

La vera amo estas daŭra, konstanta, memoranta. Nesufiĉas senti la mizeron, nur kiam la malriĉulo venas antaŭ miajn okulojn kaj interrompas min en la oportuneco; hodiaŭ la amo signifas ne havi la pacon kaj trankvilon pro la mizeroj fizika kaj morala senĉese, hodiaŭ la amo signifas labori konstante kaj kun la malfermitaj okuloj kontraŭ tiun mizeron, eĉ kiam oni ne vidas ĝin, ĉar sole kaj ekzkluzive la sentimentala materialismo estas tuŝita de ĝi unufoje dum longa periodo. La bonfareco pro la enuo ne estas amo. Hodiaŭ estas ja jam ankaŭ socialaj karieristoj-akrobatoj de l' bonfareco, kiel ilin unufoje nomas Grigoroviĉ.

La amo ne estas blinda. Ni volas la amon sen la mistiko kaj la fetiŝismo. La amo postulas neniun martirecon nek oferojn. Ĝis kiam estos turmentatoj, ĝis tiam estos ankaŭ turmentantoj, ne lasu vin turmenti kaj oferu vin pro kaj por nenio! Hodiaŭ la dekadentuloj serĉas la ĝuegon eĉ en la sufero kaj la doloroj. Ne — la amo estas solidareco — la solidareco ne deziras oferojn.

Jam Havlíček diris: »Alitempe mortadis viroj por la patrujo, por la bono de sia nacio: sed ni pro la sama kaŭzo vivos kaj laboros.« Tio estas senti, ami moderne.

Tiel sentis Dostojevskij: Aleŝa estas junulo honesta, li serĉas la veron kaj volas efektiviĝi ĝin per la tuta animo, li volas plenumi grandan faron plej baldaŭ kaj tuj, li donus por tio eĉ sian vivon. »Kvankam, malfeliĉe, tiuj junuloj ne komprenas, ke oferi la vivon estas eble la plej facila el ĉiuj oferoj en multaj tiaj okazoj kaj ke oferi ekzemple el sia vivo distingiganta per la juneco kvin ses jarojn por la laciganta, malfacila lernado, por la scienco, eble sole por tio, ke li en si deobligu la fortojn por servi al la sama vero, sama faro, kiujn li ekamis kaj kiujn li decidis plenumi — tia ofero estas tute por multaj el ili plene superforta...«

Tiel sentas Ruskin: La plej alta saĝo ne estas en la abnegacio, sed en tio lerni trovi la ĝojon en la aferoj tre malgrandaj.

Tiel sentas Amerikano Howell (mi intence citas homon pli praktikan ol filozofian): »Ni provu esti kapablaj por



oferoj malgrandaj, kiujn unu devas fari por la alia; estos ĝuste sufiĉe da ili. Multa edzino, kiu estus preta morti por sia edzo, malfeliĝigas lin, ĉar ŝi ne vivas por li. Ne malŝatu la tagon de l'malgrandaĵoj«.

Tiu amo estas laboro, estas laboremo, estas energio. Sed la laboro ne estas aristokrata sporto, elserĉanta kiel la malamikon sole heroojn kaj fortulojn, la laboro, laboro vera, kontraŭstaras la sennombrajn malamikojn malgrandajn, bagatelajn, ordinarajn, la mikrobojn de l' malbono kaj mizeroj fizika kaj morala.

La amo kontraŭstaras la malbonon konstante kaj konsekvence kaj jam en la embrio, la amo defendas kaj ŝirmas, la amo en la plej ekstrema okazo ne timas uzi feron. Sed ĝi sole ŝirmas kaj defendas, ĝi ne faras la perforton reciproke. La amo ne ekscitiĝas.

La amo tute ne faras perforton.

La etiko kaj la religio de l'amo ne estas dimanĉaj kaj festotagaj, sed ankaŭ por ordinaraj tagoj.

Kaj kompreneble oni ne bezonas la moralecon kaj religion in abstracto, en la sistemoj kaj libroj, sed en la vivo, en la ekonomio kaj en la politiko. La etiko ne estas por la skribotablo, la religio ne estas por la preĝejo. Ĉiu agado kaj pensado obeas normojn de l'etiko. La agado kaj la pensado de ĉiuj, kaj egale.

La demokratismo ne estas sole sistemo politika, sed ankaŭ morala, kaj antaŭ ĉio morala.

Tiu ĉi etiko demokrata havas sian klaran kaj precizan socialan kaj politikan idealojn, al kiuj ĝi laboras ne sole en la parlamento (tio estas la politiko ĝis nun sole festotaga, sporta, aristokrata), sed ĉie kaj en ĉio kaj per ĉio. Tiu ĉi etiko ne serĉas apogon en cirkonstancoj kaj institucioj, ĉar ĝi scias, ke cirkonstancoj kaj institucioj estas finfine sole homoj.

Tiu ĉi etiko ne timas la iniciativon. Hodiaŭ pli multe ol antaŭe ni bezonas homojn, kiuj ne timas preni sur sin la respondecon — tie ĉi estas bezona la saĝa kaj senekscita prudento.

Tiu ĉi demokrata etiko de l'laboro ne estas hedonisma. Ĝi ne kredas, ke la tasko de l'prudenta homo estus konstante kaj ruzege eltrovadi novajn kaj novajn ĝuojn.

La moderna etiko ne estas materialisma. La solidareco sociala havas malmulte da laboro, se la tuta vivo estas en la preta cerbo. La moderna etiko kredas, ke per la sociala



solidareco kulturiĝos ĉiam pli kaj pli fortaj individuoj. Individuoj, ne egoistoj.

El la libro »*Otázka sociální*« (Sociala problemo).

## II.

Multaj homoj ne komprenas, ke estas eble ami, kion ni malvarme prijuĝas. La plejmulto de l'homoj amas sole, kion ĝi adoras. Sed la vera kaj konstanta amo estas fondita pli bone sur la konado ol sur la adorado. Pri tio ĉiu povas konvinkiĝi en la rilatoj kun la homoj tre baldaŭ kaj tre facile. Kaj ne alia estas la afero koncerne patriotismon. Kial ne amus sian patrujon tiu, kiu ĝin studas kaj ekkonas? Kial ne amus sian popolon, kiu ekkonas ĝiajn malbonajn flankojn? Diri kaj kondamni proprajn mankojn ne signifas, ke ni rigardas fremdaĵon kiel bonan, pli bonan.

Por ami la propran nacion oni ne bezonas malami la nacion alian; eble al multaj estas bezona tia kontrasto de l' sentoj, sed la amo vivanta per la malamo, ne estas nobla.

El la enkonduko de studaĵo pri *Kirějevski*.



## PROPAGANDO DE INTERNACIAJ MOVADOJ.

Verkis *Dr. Stan Kamaryl*. — (Fino.)

La unua kondiĉo de sukceso de la propagando de lingvo internacia estas, ke ĝi estu efektive internacia; ĉar ĉiuj servoj, kiujn la enkonduko de ĝi povas liveri, estas laŭ sia esenco internaciaj. Tio ĉi estis ĉe esperanto en plena grado. Nun ne estas iom grava urbo, kie ne estus esperantistoj. Sed por tio oni povas danki sole tiun memorindan cirkonstancon, ke propagando de esperanto komencis samtempe preskaŭ ĉe ĉiuj gravaj nacioj. Estis en la jaro 1897 kiam en Francujo komencis L. de Beaufront eldonadi la gazeton »*L'espérantiste*« kaj samtempe penis instigi al laboro esperantistojn ĉe ĉiuj nacioj. Kaj efektive en la komenco de la unua deko de 20. jarcento komencis propagando ĉe ĉiuj nacioj, kaj komencis ĉe ili eliradi propagandaj gazetoj. Estis: »*Esperantistische Mitteilungen*« en Germanujo, »*Antaŭen esperantistoj*« en Peruo, »*La Lumo*« en Kanado, »*Bohema esperantisto*« en Bohemujo, »*Meksika lumturo*« en Meksikujo, »*The Esperantist*« en Anglujo, »*Ruslanda esperantisto*« en



Rusujo, »La Suno hispana« en Hispanujo, »Rondiranto« en Bulgarujo. Kelkaj tiuj gazetoj ĉesis post iom da tempo eliri, kaj reviviĝis pli poste aŭ estis anstataŭitaj de aliaj, sed la movado restis kaj daŭre konservis sian internacian karakteron tiel, ke en Dresdena kongreso parolis reprezentantoj de 42 diversaj nacioj, kaj ke oni povas montri esperantisman kiel la plej internacian movadon.

La dua specialaĵo de esperanta propagando estas ĝia demokratismo, tendenco popularigi. Ankaŭ ĝin oni atentis en la plej granda maniero. Tio estas korekta tial, ĉar por enkonduki lingvon internacian oni ne povas turni sin en la unua vico al ŝtata registara potenco, ke ĝi rapidigu ĝian uzadon per enkonduko de ĝi en publikajn lernejojn, ĉar tio povos okazi nur tiam, kiam esperanto estos ĝenerale disvastigita, pruvita kaj uzata; instruado ĉiam malfruiĝas koncerne progreson de kulturo, ĉar lernejo neniam devas fariĝi eksperimenta instituto kaj infanoj estas tro valora promeso por estonteco ol esti eksperimenta materialo. Nenie farus eksperimentado tiel grandajn malutilojn kiel en lernejo. Tial estas bezone turni sin direkte al ĉiuj homoj, ke ili lernu esperanton pro propra deziro kaj kompreno de ĝia bezono kaj utileco. Ankaŭ tio sukcesis kaj tiel, ke inter esperantistoj estas homoj de la plej diversaj klasoj kaj kleroj de universitataj profesoroj ĝis simplaj laboristoj.

Kun tio rilatas ankaŭ peno atentigi je esperanto per ĉiuj eksteraj rimedoj: reklamo, bruaj kongresoj, organizado de ĉiuj kaj de ĉio ajn, manifestoj, paroladoj kaj simile.

La tria specialaĵo de tiu propagando estas ĝia neŭtraleco koncerne samtempajn movadojn politikajn kaj religiajn. Tiun devizon esperantistoj ofte tre malbone komprenis kaj la malkompreno daŭras ĝis nun preskaŭ ĉe ĉiuj nacioj ĉe oficialaj sferoj esperantistaj. Neŭtraleco de esperantismo povas esti rajtigita sole koncerne saĝajn penojn kaj movadojn sociajn, etikajn, religiajn. Sed estas nelogike voli direkti propagandon de esperanto tiel, ke ĝi ne kolerigu partianojn de penadoj malnovaj, venkitaj, malveraj, reakciulaj. En tio esperantistoj tre ofte eraris kaj eraras ĝis nun. Tio rezultas eble el tio, ke komence aliris al nia movado homoj, al kiuj pli multe ol reala racionalismo de la movado plaĉis la utopioj, kiujn ili mem enkondukis en ĝin. Estis homoj de granda volo kaj malgranda povo.

Estis tre ofte homoj venintaj el la malsupraĵoj de la kulturo, ne el la supraĵoj. Homoj, kiuj atendis, ke, se ili



parolos esperanton, mondo transformiĝos, la irado de homaj aferoj ŝanĝiĝos, kaj ili venos al direktiloj de civilizacio. Homoj, kiuj poste miris, ke atendata ŝanĝo ne okazis, kiel miris la unuaj kristanoj, ke tiel longe ne venas reĝeco de Dio sur la teron. Tielaj esperantistoj kompreneble ne kuraĝis diferenci eĉ inter la vero kaj malvero. —

Ni redaktas nian revuon kaj volas per ĝi propagandi esperanton sur bazo de niaj progresemaj ideoj. Tre ofte nia peno paroli direkte la veron kunpuŝiĝas kun malkompreno. Oni demandas nin, kiel ni ekkonas, kia maniero de propagando estas bona, ĉu tiu de ni, novaj esperantistoj, ĉu tiu de la alia partio. Ho, saĝeco de filistroj! Neniam ĉesos amantoj de malnovaj aranĝoj, klerikoj de ĉiuj religioj kaj konservativuloj de ĉiuj koloroj fini siajn argumentojn per parolo de Pilato: »Kio estas vero?« Se ni estas esperantistoj, ni estas ankaŭ racionalistoj kaj sen pluo ni kredas, se ni volas logike pensi, ke nia kono povebligas al ni efektive, diferenci inter progreso kaj malprogreso. Se mi scias, ke klerikalismo kaj nacionalismo estas ne plu taŭgaj vidpunktoj, mi tion scias daŭre, eĉ se mi skribas por esperantista publiko, kaj se mi scias, ke tiuj tendencoj estas malutilaj, mi parolas kontraŭ ili esperante tiel laŭte kiel en ia ajn nacia lingvo. Tiel ni volas por esperanto batali. Por tia propagando estis fonditaj niaj revuo kaj asocio.



## LA SEP KORVOJ.

Germana fabelo. Rakontas *Ern. Trummlitz*.

Malriĉa taglaboristo mortis kaj postlasis al sia edzino krom mizera doma meblaro sole sep sanfortajn knabojn kaj belegan filineton, kiu estis nur dujara. La sep knaboj ne estis ja vere malbonaj, sed, kiel junaj kreskantoj, ili estis malĝentilaj kaj petolemaj kaj kaŭzis al sia kompatinda patrino multe da zorgo kaj ĉagreno tiel, ke ŝi ofte estis devigata riproĉi kaj puni ilin.

Unufoje la sep malĝentiluloj ŝerce eĉ sanktan dimanĉmatenon sidiĝis kaj ludis je karto, dum la sonoriloj alvokas la piulojn en la preĝejon; tiam la patrino, kiu treege sanktigis la tagon de Sinjoro, tiel ekkoleris, ke ŝi renversis la tablon kune kun la karto kaj ekkriis senpripense »Ho vi Dionforĝesintaj korvidoj, vestu kitelon de diablo kaj forflugu en



la vastan mondon kiel nigraj korvoj por ke miaj okuloj neniam revidu vin!»

Apenaŭ ŝi diris la parolojn, tiam la sep knaboj fariĝis sep korvoj, kiuj elflugis el la fenestro kaj malaperis. Tiam la patrino ektimegis kaj tre pentis sian nepripensitan parolon, ĉar serioze ŝi estis antaŭpensinta nenion malbonan el tio. Sed patrinmalbeno estas pli peza ol fera monto, kaj tial la sep korvoj devis resti sep korvoj, kvankam la patrino redeziris sian parolon.

De tiam la patrino vivadis izole kune kun sia filineto; ŝi edukadis tiun ĉi en diotimo kaj bonaj moroj kaj ŝi vidis kun ĝojo, ke la knabino des pli progresadas en bonmoreco kaj ĉiuj virtoj, ju pli ŝi kreskas. Kiam ŝi estis fariĝinta jam tre prudenta kaj helpanta al la patrino ĉiun doman laboron, ŝi unu tagon diris: »Kara patrineto, kial do vi ploras tiel ofte? La bona Dio donas al ni sufiĉe per via kaj mia diligenteo, la malmulton, kion ni bezonas; kaj laŭ mia scio mi mem ne ĉagrenas vin.«

Tiam la patrino sopirege respondis: »Jes, infano mia, mi do konfesos, kio premas min. Vi rememoras de via plej frua infaneco, ke vi havis sep fratojn, kaj ne alie pensas ol, ke ili formigris en la vastan mondon por serĉi la feliĉon, ke ili verŝajne ne trovis ĝin, kaj de longe pereis kaj mortis. Tiele ankaŭ mi rakontis ĉiam al vi; sed nun mi diros al vi la veron: fratoj viaj ĉiuj estas ankoraŭ vivantaj. Ili ne vivas ja en homa formo, sed ili traflugas kiel korvoj la mondon; ĉar mi tion deziris al ili kolerigita pro ilia sensanktigo de dimanĉo. Ju pli mi maljuniĝas, des pli mi pentas mian senpripensan parolon, kaj mi fordonus ĉion, se mi povus vidi ilin ree en homa formo.« »Nu, patrineto« diris tiam la filino »se la afero tia estas, ne ĉagreniĝu plu; vidu do: mi jam pligrandiĝis kaj fariĝis prudenta, kaj mi opinias, ke mi kun dia helpo povas savi la kompatindajn fratojn. Lasu do eliri min en la vastan mondon por serĉi ilin, kaj se mi trovos ilin, ni cetere konfidu al Dio, kiu pardonos ilin, ĉar vi ankaŭ estas pardoninta ilin jam longe.

La patrino benis la filinon kaj lasis ŝin eliri en la mondon por serĉi la fratojn. Sed tiu ĉi prenis nenion plu kun si ol ringeton de la patrino, panbulon kontraŭ la malsato kaj seĝeton kontraŭ la laceco. Tiam ŝi enmigris en la vastan mondon multajn tagojn, multajn semajnojn kaj sidiĝis multmilfoje sur sian seĝeton kaj venis eĉ ĝis la fino de l' mondo, ne trovinte siajn fratojn.



Fine ŝi venis ankaŭ al la suno, sed tiu ĉi brulis varmege, tial ŝi rapide foriris kaj venis al la luno, sed tiu ĉi estis tre malvarmega, tial ŝi forkuris al la steloj afable brilantaj, kiuj sidis en multkolora vico sur oraj seĝetoj al la ĉielo, kaj kore salutis la knabinon.

Kiam la brilradia matenstelo estis aŭdinta, kion serĉas la bona infano, ĝi levis sin, donis al ŝi osteton de la senkulpa ĉielkolombo, kaj diris al ŝi: »Prenu tiun ĉi osteton, reiru en la mondon kaj malfermu la vitran monton; tie viaj fratoj loĝas.

Ĝojigita la knabino envolvis la grandvaloran ŝlosilon en sian tuketon kaj reiris en la mondon, kie ŝi baldaŭe trovis la vitran monton, kiun pro ĝia spegulplateco neniu povis suprenrampi, kaj kies pordo estis fermita tre firme. Nun ŝi volis elpreni la osteton, sed, ho ve! kiam ŝi malfermis la tuketon, ĝi estis malplena, kaj la donaco de la bona matenstelo estis perdita. Tiam la knabino tre ĉagreniĝis, ĉar ŝi volontege estus vidinta kaj savinta la fratojn tiel longe vane serĉitajn.

»Nu«, — pensis la bona fratino — »senkulpa kiel ĉielkolombo mi same ĝis nun estis kun helpo de Dio, eble helpos osteto de mi; devas do esti savotaj la kompatindaj fratoj. Pensite, farite. Rapide la fratineto prenis tranĉilon, detranĉis sian malgrandan fingron kaj apenaŭ ŝi estis tuŝinta per ĝi la pordoŝloson, kiam la pordo malfermiĝis kaj la enirejo en la vitran monton kuŝis antaŭ ŝi.

Tiam pigmeo aperis en la enirejo kaj demandis ŝin: »Kion vi serĉas tie ĉi, infano mia?« »Mi serĉas la sep korvojn, fratojn miajn« respondis la knabino. La malgrandulo diris: »Sinjoroj la korvoj forflugis; sed iru do internen, ili certe baldaŭ revenos.«

Nun la knabino sekvis la malgrandulon profunden en la vitran monton, ĝis ĉambro formita kiel nestego, en kiu staras sep litetoj, kaj sep tabletoj. Sur ĉiun tableton la pigmeo nun starigis telereton kaj pokaleton kun manĝaĵo kaj trinkaĵo por la korvoj. La malgrandulo afable invitis la knabinon preni al si, se ŝi malsatas aŭ soifas. Ŝi manĝis el ĉiu telereto kaj trinketis el ĉiu pokalo; sed en la lastan ŝi enĵetis la ringon de sia patrino. Post tio, laca, ŝi kuŝigis sin en unu el la litetoj kaj baldaŭ ekdormis.

Nelonge post tio la korvoj enflugis tra la fenestro kaj sidiĝis al la tablo. Tiam mirante ili diris unu post alia: »Kiu manĝis el mia telereto? Kiu trinkis el mia pokaleto? Tio



certe estis buŝo de homo«. Kaj la plej juna, eltrinkinta sian pokalon, kun mirego laflugilojn movante, ekkriis: »Ho rigardu tien ĉi, mi trovas en mia pokalo la ringon de mia patrino; tio sendube sole bonaĵon signifas, certe ni nun fine estos savataj!« »Ho rigardu do tien ĉi, kiu kuŝas en mia liteto!« alia ekkriis. Ĉiuj sep korvoj flugis al la lito, ekvidis la belan knabinon, kiu dormas en ĝi, kaj ekkriis tre ĝojigitaj: »Tio certe estas nia fratino, kiu alportis la ringon! Ho vekigu, nia fratineto, alkonduku nin al nia patrineto!«

Tiam ekvekiĝis la knabino, kaj apenaŭ ŝi estis turninta la okulojn al la nigraj birdoj, tiuj ĉi rapidege perdis la bekojn kaj la plumojn, aliformiĝante en belajn junulojn, tiel same blondharajn kaj bluokulajn kiel ŝi mem. Nun la ĝojo estis granda: fratino kaj fratoj kisis kaj ĉirkaŭprenis unu la alian, kaj gaje eliris el la vitra monto al la kore ĝojigita patrino, kies plej bonaj filoj ili de tiam fariĝis.



## ŜTELINTO KAJ ŜLOSILOJ.

El »*Po stopě pravdy*« de Fr. Procházka. Esperantigis R. Fridrich.

Arestita ŝtelinto rigardis tra serurtruo de sia malibereja kamero kaj ekvidis en koridoro pendantan faskon da ŝlosiloj.

»Jen, mia malfeliĉo«, li ekpensis. »De mia tuta dekadenco estas kulpa sole la eltrovinto de ŝlosiloj. Sen tiuj iloj, mi estus nek povinta pensi pri enrabado kaj se la ŝlosiloj ne ekzistus, mi ankaŭ ne estus enfermita.«

»Ne aljuĝu vian kulpon al senkulpuloj«, respondis unu ŝlosilo. »Ni estis eltrovitaj por protektadi havon kaj ni turnas nin sole kontraŭ tiun, kiu trouzas nin por la malo. Vi serĉadas sole fermitajn ejojn, do ne plendu, ke vi fine tie kaptiĝis.«



## MLADÍ ČEŠTÍ ESPERANTISTÉ.

Skončil jsem svou propagační přednášku a rozmlouval jsem dle svého zvyku s posluchači. Tu zpozoroval jsem hošíka, který přišel k jednomu ze samideánů, kteří mne provázeli, a ptal se ho na něco. Pán neslyšel dobře, hoch opakoval svou otázku, a já s opravdovým překvapením a

## JUNAJ BOHEMAJ ESPERANTISTOJ.

Mi finis mian propagandan parolon kaj interparolis laŭ mia kutimo kun aŭskultintoj. Jen mi rimarkis malgrandan knabon, kiu venis al unu el la gesamideanoj akompanantaj min kaj demandis lin pri io. La sinjoro ne aŭdis bone, la knabo ripetis sian demandon, kaj mi kun vera surprizo



radostným podivem slyšel esperantskou otázku »Kie estas fraŭlino Adelka?« (Kde je Adélka?) Hošík, který ptá se na dívku a ptá se esperantsky — ho, jak mohl bych nechati jej bez povšimnutí? Přistoupil jsem a dal jsem se s hochem do esperantského hovoru, očekáváje, že bude zmaten. Ale hoch bez rozpaků zodpovídal mé otázky plyně a správně, a já viděl, že maličký úplně ovládá jazyk mezinárodní.

Byl jsem — jistě právem — překvapen slyše tak dobře mluvíti esperantsky hocha ještě ne osmiletého (žáka druhé třídy školy obecné), ale ještě více mne podivilo, když jsem shledal, že hoch je esperantistou teprve pět měsíců, ve kterých navštěvoval kurs esperanta konaný matkou oné dívky, na níž se ptal. Tu nejlépe jsem viděl, že není třeba znáti cizích jazyků, abychom se naučili brzy esperantu. Vyprávím to těm, kdož by tomu nevěřili, nebo potřebovali míti důkaz o tom pro jiné.

Hoch je synem p. Františka Nováka, hodináře v Praze, dívka je dcerou p. Vojtěcha Krause, magistrálního adjunkta v Praze. Výjev udál se dne 24. dubna 1910 v Liboci u Prahy.

Kéž zmnoží se podobné případy! V mládeži je budoucnost naší věci!

Bšk.

kaj ĝojplena miro aŭdis la esperantan demandon: »Kie estas fraŭlino Adelka?« Malgranda knabo, kiu demandas pri knabino kaj demandas esperante — ho, kiel mi povus lasi lin sen atento? Mi alpaŝis kaj komencis interparoli esperante kun la knabo atendande, ke li estos konfuzita. Sed la knabo senembarase respondis flue kaj korekte miajn demandojn kaj mi vidis, ke tiu ĉi malgrandulo plene posedas la internacian lingvon.

Mi estis — certe prave — suprizita aŭdante tiel bone paroli esperante la knabon ankoraŭ ne okjaran (lernanton de dua klaso de popola lernejo), sed pli multe mirigis min, kiam mi konstatis, ke la knabo estas esperantisto nur kvin monatojn, en kiuj li vizitadis kurson pri esperanto faritan de la patrino de la knabino, pri kiu li demandis. Jen mi plej bone vidis, ke oni ne bezonas scii fremdajn lingvojn por baldaŭ ellerni esperanton. Mi rakontas tion ĉi al tiuj, kiuj ne kredus tion aŭ bezonus havi pruvon pri tio por aliaj.

La knabo estas filo de s-o František Novák, horloĝisto en Praha, la knabino estas filino de s-o Vojtěch Kraus, magistrata adjunkto en Praha. La sceno okazis la 24an de aprilo 1910 en Liboc apud Praha.

Multiĝu similaj faktoj! En la junularo estas estonteco de nia afero!

Bšk.

## ZPRÁVY SPOLKOVÉ.

Pražští esperantisté, členové a přátelé »S. č. e.« a spolků v něm sdružených, scházejí se pravidelně: v úterý o 8. hod. več. v restaurantu Kolářově (I., Celetná ul.), ve středu o 8. hod. več. v restauraci »u Líbalů« (VII., Bělského tř.), ve čtvrtek o 6. hod. več. v Ženském klubu českém (II., Jungmannova tř.), v pátek o 8. hod. več. v host. »v Lázních« (III., Lázeňská ul.)

Česká společnost esperantistů v Praze (Bohema societo esperantista en Praha) konala dne 3. března 1910 za hojně účasti třetí valnou schůzi za předsednictví p. účetního rady Karla Biskupa ve svých spolkových místnostech v restaurantu Kolářově. Jako delegáti přátelských spolků zavítali k této schůzi sl. B. Vaničkova za První dámský spolek esperantský, pp. J. Hradil a Saxl za klub vinohradský a p. Pařík za klub smíchovský. Po uvítání p. předsedajícím přednesl jednatel p. Josef Barviř zprávu o čin-



nosti za uplynulý rok. Z této sluší uvést, že hlavní snahou bylo šířiti známost o esperantu zejména pořádáním kursů; ač bylo žádáno o propůjčení mnohých místností veřejných, hlavně školních učeben, nebylo žádostem těm vyhověno; důvod spočíval v tom, že předešlý rok vypukla epidemie spály; přece vyučováno v obchodní škole Maděrově p. J. Barvířem a ve škole na Smíchově p. L. Bergrem. Styky s cizinou byly dosti čilé, zejména s jednotlivci. Schůze členské byly pořádány každého týdne a bylo při nich dbáno, aby rozhovory daly se v esperantu. Přednášky konané těšily se hojně účasti členstva. K oslavě Zamenhofově uspořádán zdařilý přátelský večer dne 14. prosince 1909. Po schválení zprávy jednatelské přednesena zpráva pokladní p. Jar. Sýkorou, kteráž vykazala — ač malý — přece vzestup financí spolkových; byla jednohlasně schválena po doporučení revizora účtů p. úč. rady Chaloupeckého. Zpráva knihovni sl. A. Crhové byla rovněž schválena. Po té přikročeno k volbě výboru. Předsedou zvolen p. Vojtěch Kraus, předseda redakce Pražského adresáře, místopředsedou p. účetní rada Karel Biskup, členy výboru p. L. Berger, technik, sl. A. Crhova, p. Rudolf Hromada, technik, p. K. Koutek, úč. akcesista, p. Loucký, úř. Slavie, p. F. Tůma, obchodník. Náhradníky p. A. Bartošova, sl. K. Fiedlerova, p. prof. J. Houdek, p. K. Medáček. Za revisory účtů uč. rada J. Chaloupecký, vrch. úř. J. Sýkora. Dříve než schůze byla skončena, promluvil delegát vinohradského klubu p. J. Hradil, poukázav na důležitost společné práce, již přál mnoho zdaru. Doslovem p. předsedajícího, že společná práce jest vítána v našem středu s povděkem, že však naše společnost to nikdy nebyla, jež živila rozbroje, že šla vždy svou cestou samostatně, neohlížejíc se na útoky a nepřátelské jednání protivné strany, schůze skončena.

**Kroužek esperantistů ve Chvalkovicích** konal v r. 1909 v zimním a jarním období bezplatný kurs esp. zároveň s rozmluvami v české mateřské škole v Pavlovicích vždy v neděli odp. (2—4), kde přednášel p. učitel Alb. Neužil. V letním období konány byly schůzky vždy ve čtvrtek večer (7—9 hod.), buď v hostinské zahradě p. Spurného, buď v kvetoucích lukách. Dne 5. VII. 1909 podniklo 10 členů vycházku do vesnice Vesky. Členstvo platí dobrovolný příspěvek 20 h. měs. na knižnici a režii kursů; tak sešlo se v r. 1909 celkem 19 K 90 h. Kroužek oslavil narozeniny tvůrce esperanta a zaslal oslavenci blahopřejný dopis. Od 14. II. 1910 členové kroužku scházejí se pravidelně v pondělí večer (1/28—1/210 h.) pěstující esp. konversaci a zpěv.

**Klub esperantistů na Kladně** konal dne 24. IV. 1910 ustavující valnou schůzi, na níž krásně o esp. promluvil p. řídící Em. Batěk z Říčan a již účastnil se zástupce městské rady kladenské p. J. Kraus. Do výboru zvoleni byli pp. Pelc (předs.), Nevšimal (místopř.), Kočí (jedn.), Štrach (pokl.), Němeček (zapis.), Souček, Novotný a Stríbrský. Protektorát spolku přijala městská rada kladenská. Mladý klub těší se přízni veřejnosti i lze se nadíti, že velmi brzy sesílí a vzroste.

**Klub esperantistů, hádankářů a šachistů ve Vítkovicích** konal 20. II. 1910 valnou schůzi za hojně účasti členů i hostů, na níž pro zásluhy o jazyk mezinárodní zvoleni byli za čestné členy pp. Dr. L. L. Zamenhof, lékař ve Varšavě, a Jos. Krumpholtz, učitel v Bystřici p. Host. Do výboru zvoleni byli: p. Jan Gabzdyl (předs.), p. F. Kučera, (místopř.), p. Arn. Janečka (jedn.), p. Al. Bohuš, (pokl.), pí M. Kučerová a p. Sedláček (přisedící) a p. Fr. Talpa (revisor). Spolek pořádal kursy esp. pro začátečníky (od 13. III. do 15. IV. každou druhou neděli v české škole vítkovické) i pro pokročilé (od 6. III. každou druhou neděli tamtéž) a konversační večírky (ve středu od 8 hod. v českém domě). Dopisy přijímá p. Arn. Janečka, obchodník ve Vítkovicích č. 199.



**Z mimosvazových spolků českých esperantistů.** — *Klub esperantistů na Král. Vinohradech* (Esperantista klubo en Král. Vinohrady), založený 7. IX. 1909, konal 14. II. 1910 v kavárně »Březinka« první řádnou valnou hromadu. Schůzi zahájil předseda p. Saxl uvítáním přítomných členů i delegátů spolků, mezi nimiž byli zástupci Svazu čes. esp. (p. Schmidt), Čes. společnosti esp. (p. Barvíř), esp. odboru dámského (sl. Kroupova), dále zástupci spolků Bohema unio esp., Stelo de espero a Bohema propaganda societo esp.; omluvila se redakce »Čes. esp.« Z obšírné jednatelské zprávy, kterou přednesl jednatel p. Brotan, uvádíme: konána propagační přednáška (p. Hradil); pořádány kursy esp. pro začátečníky ve dvou odděleních (ve čtvrtek o 7 h., v pátek o 8 h.), navštěvované 65 posluchači (ve zprávě po zásluze odsouzeno jednání městské rady vinohradské, která zamítla žádost za propůjčení školních místností pro kursy); pořádán velmi animovaný přátelský večírek (2. XI. 1909); oslaveny 50leté narozeniny dra Zamenhova slavnostní členskou schůzí (13. XII. 1909); klub čítá 74 členy; z cizích esperantistů klub hostil žulnalistu Ohlsona z Göteborgu a prof. Metaksu z Tiflisu (18. X.). Dle pokladní zprávy, přednesené sl. Bernardovou, činil příjem K 600·69, vydání K 481·63, tedy přebytek K 119·06. Dle zprávy revuisty klub odebíral časopisy: Český esperantista, Čas. čes. esp., Studento, Britisch Esp., Germana esp., Duonmonata, Esperanto, La Revuo, Japana esp., Lingvo internacia. Po přijetí zpráv vykonány volby; zvoleni pánové a dámy: J. Hradil (předs.), A. Albrecht (místopř.), R. Brotan (jedn.), R. Saxl (revuista), A. Bernardova (pokl.), A. Wenzelova (knihovní), B. Brožek (archivář) a J. Brožek (zapis.). Usneseno vyslati delegáty (pp. Hradila a Saxla) na valnou hromadu »Čes. společnosti esp.« (na pozvání přednesené p. Barvířem). Podniknuta sbírka na prospěch matičního milionu, která vynesla K 11·75. Schůze zakončena společným zapěním hymny »Espero«. (Dle došlé oficiální zprávy.) — Týž klub pořádal 16. IV. 1910 v zimní zahradě Nár. domu na Král. Vinohradech zdařilou přátelskou zábavu, kterou mladý tento klub velice pěkně se representoval. Večírek, jež navštívilo na 250 osob, hostil zástupce všech pražských spolků esp., z nichž dlužno hlavně zmíniti se o zástupcích Svazu čes. esp., Čes. společnosti esp., Dámského čes. spolku esp., esp. klubů v Holešovicích, Libni, Žižkově atd., jakož i klubu německých esp. pražských. Po česko-esperantském proslovu předsedy p. Hradila následoval vlastní program, z něhož vynikla zpěvní čísla sl. Koutské a p. Peršla a hudební čísla okteta »Nokturno« a jenž obsahoval esp. přednesy pí Hradilové, pp. Hradila a Brotana. Po programu následovala taneční zábava, jež trvala do časných hodin ranních, kdy účastníci rozcházel se s přáním, aby takovéto večírky konaly se častěji. (Dle oficiální zprávy.) — *Akademia Esperanto-klubo en Praha* svolal valnou hromadu, k níž dostavili se 4 (čtyři) členové a při níž bylo konstatováno, že ani členové výboru nemají tu čest se znáti. To je ovoce překotného a umělého vydupávání spolků! — *Klub esp. v Brně* připojil se k »B. u. e.« — *Klub esper. v Plzni* dostal, dle jednatelské zprávy, podané na valné hromadě (26. II. 10), subvenci od městské rady (100 K), Občanské záložny (20 K) a Osvětového svazu (10 K). — *Klub esp. v Novém Bydžově* zvolil za čestného člena pana — Kühnla; ten jim za to stál, dr. Zamenhof ne. — *Klub esp. v Humpolci* založen byl 16. II. 1910.

**Pro propagační fond »S. č. e.«** dosud věnovali: pp. Biskup a Schmidt (Praha) po 10 K, p. prof. Fridrich (Prostějov) 7 K (5 K hotově, 2 K v respondkuponech), pp. Barvíř, Bouška, Iglauer a pí Krausová (Praha) po 5 K, sl. Cerhova 3 K, p. Riegel (Praha) 2 K a p. Vkt. Novotný (Kralupy) 1 K. Celkem sebráno 53 K. Vivant sequentes!

Zodpovědný redaktor H. K. Bouška. — Nakladatel Jan Iglauer. — Tisk »Politiky« v Praze.



**Podporujte a doporučujte firmy u nás inserující!**



## Esperantské nálepky

100 kusů za K — 60, poštou K — 70  
500 » » » 2 50, » » 2 60  
Méně nežli 100 kusů se nezasílá.

## Esperantaj glumarkoj

100 ekzempleroj — 50 Sm.  
500 » » 1 — »

liverataj de **J. Iglauer, Praha III.-495, Bohemujo.**

Slunečníky nejmodernější.  
Slunečníky „Chantecler“.  
:: Hole pánské. ::

Zahradní železný nábytek.  
Židle, stoly, stany a t. d.  
Zahradní dřevěný nábytek.

# Hynek Gottwald

v Praze, Na Příkopě 2.

Přikryvky do kočárů.  
Přikryvky flanelové.  
Přikryvky prošívané.

Slunníky zahradní. Za-  
hradní nábytek proutěný.  
Žaluzie a j. záclony cvilink.

Cenníky koberců, záclon, želez. a mosaz. nábytku zdarma a franko.



## FR. SKRČENÝ

V PRAZE, VODIČKOVA ULICE 32.

Filiálka: Příkopy, č. 27 n. „Velký Bazar“

doporučuje ve velkém výběru za velmi levné ceny:  
**Lampy, lustry, ampule, sklo, sklenice**  
na pivo, víno, vodu a likéry. **Porculánové**  
přibory jídelní, na kávu a čaj. **Domácí a**  
**kuchyňské nádobí. :: Úplné vybavy**  
**pro nevěsty. :: Cenníky zdarma.**



**Podporujte a doporučujte firmy u nás inserující!**

## Učebné pomůcky pro samouky i kursy.

### Vydání malá.

- Sv. 1. **Učebnice esperanta.** Upravili Th. Čejka a Jos. Krumpholc. — 6. vyd. zcela přepracované. — Cena 20 h, poštou 23 h.  
Sv. 2. **Slovníček esper.-česky.** Sestavil Th. Čejka. — Cena 20 h, poštou 23 h.  
Sv. 3. **Slovníček česko-esper.** Sestavil Th. Čejka. — Cena 30 h, poštou 33 h.  
Sv. 4. **Methodická učebnice esperanta** (mluvnice, cvičebnice a oba slovníčky) Sestavili Th. Čejka a Jos. Krumpholc. — Cena eleg. váz. výt. v kapesním formátu K 1'10, poštou K 1'20.  
**Slovník česko-esperantský** (obsahuje více než 10.000 slov). Sestavil Th. Čejka. Cena 90 h, poštou 95 h.

### Vydání velká.

- Sv. I. **Úplná učebnice esperanta.** Napsali Th. Čejka a Jos. Krumpholc. — IV. vyd. (doplněné). — Cena K 1'50, v eleg. angl. měkké vazbě 2 K, poštou o 10 h více. Obsahuje Zamenhofovo „**Fundamento de esperanto**“.  
Sv. II. **Slovník esper.-česky** (podrobný). Sestavil Th. Čejka. — Cena 2 K, v eleg. angl. měkké vazbě 2'50, poštou o 10 h více.  
Sv. III. **Slovník česko-esperantský** (podrobný). Sestavuje Th. Čejka.  
Sv. IV. **El la historio de esperanto.** Obsahuje Dr. L. Zamenhofův „List o původu esperanta“ a zajímavou řeč Dra K. Beina a Dra L. Zamenhofa, proslovenou na I. kongresu esperantistů 1905. — Cena 30 h. Spisek tento hodí se znamenitě k dalšímu cvičení v esperantu, zvláště pro výborný sloh esperantský.

Vedle těchto spisů doporučujeme ještě časopis **Česky esperantista** roč. I. a II. ve sníž. ceně 2 K a **Revuo Internacia** (160 str. poučné i zábavné četby) za 2 K. — Kdo objedná všechny tyto 3 časopisy najednou, obdrží je, pokud zásoba stačí, vyplaceně za K 5'50. — **Všechny objednávky vyřizuje** — však jen po předchozím zapravení obnosu — **TH. ČEJKA, Bystřice-Hostýn, Morava.**

**Propaganda.** Nejvhodnější pomůckou propagační je „**Esperanto na jednom listě**“. Úplná mluvnice a slovník esperantsko-česky (obsahuje všechna základní slova, na 2000 kmenů tedy skutečný klíč k Esperantu)! — 1 výt. za 2 h, 10 výt. franko za 20 h, 50 výt. za 55 h, 100 výt. za 1 K, 500 výt. za 3 K, 1000 výt. za 5 K. — Za obnos předem obdržený (i v poštovních známkách) zasílá **Th. Čejka, Bystřice-Hostýn, Morava.**

**La plej saniga trinkaĵo** estas tutmonde konataj senalkoholaj **ŝaŭmantaj limonadoj bonbonoj de Maršner** (kun gusto framba, citrona, fraga, ĉeriza) por preparo de bonega re-freŝiga senalkohola trinkaĵo.

Nefalsita sole  
kun jena  
protektmarko.



Nefalsita sole  
kun jena  
protektmarko.

Ĉie ricevebla, kie estas aŝioj kun protektmarko, kiu estas sur ĉiu aparta bonbono. Jara produkto 60 milionoj da pecoj. **Lu-Sin** parfumas la spiron. **Klairon**, la plej ŝatata frandaĵo de nova tempo. **Bouchées à la reine**. **Peppermint-Lozenges**. Ĉiujn specojn de ĉokoladoj laktaj, kuirotaj kaj frandaj la plej bonkvalitaj proponas

**První česká akc. společnost továren na orientálské cukrovinky a čokoládu na Král. Vinohradech** dříve **A. Maršner** (Unua bohema akcia societo de fabrikoj de orientaj sukeraĵoj kaj ĉokolado en Král. Vinohrady, Bohemojo, antaŭe A. Maršner).

Vendejoj: **Praha I., Ferdinand. tř. (Platýz). Praha II., Václavské nám. Wien VI., Theobaldgasse 4.**